

ESPERANTO PARA UM MUNDO MODERNO – Exercícios e Respostas

Por Adonis Saliba

Capítulo 1	Exercícios	Respostas
01.01. Leia em voz alta tentando compreender o que está escrito	Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj, la lingvo Esperanto prezentas al la mondo civilizita la sole veran solvon de la problemo de lingvo neŭtrala, ĉar tre facila por homoj nemulte instruitaj, ĝi estas komprenata sen peno de la personoj bone edukitaj.	
Capítulo 2	Exercícios	Respostas
02.01. Onde estão os substantivos, adjetivos, advérbios e verbos?	<p>Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj, la lingvo Esperanto prezentas al la mondo civilizita la sole veran solvon de la problemo de lingvo neŭtrala ĉar tre facila por homoj nemulte instruitaj, ĝi estas komprenata sen peno de la personoj bone edukitaj.</p> <p><i>Alguns substantivos e adjetivos parecem com um "-n" no final. Não se preocupe agora com isso, explicaremos isso mais a frente.</i></p>	<p><i>Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj</i> (adj) ... (adj) (adj) ... (adv) ... (adj) (adj)</p> <p><i>elementoj, la lingvo Esperanto prezentas al la mondo</i> (sub) (sub) ... (sub) .. (verbo) (sub)</p> <p><i>civilizita la sole veran solvon de la problemo de</i> .. (adj) (adv) . (adj) .. (sub) (sub)</p> <p><i>lingvo neŭtrala ĉar tre facila por homoj nemulte</i> <i>instruitaj,</i> .. (sub) .. (adj) (adv) . (adj) (sub) .. (adv) (adj)</p> <p><i>ĝi estas komprenata sen peno de la personoj bone edukitaj.</i> (adj) (sub) (sub) (adv) .. (adj)</p>

<p>02.02. Traduza para o português</p>	<p>Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj, la lingvo Esperanto prezentas al la mondo civilizita la sole veran solvon de la problemo de lingvo neŭtrala, ĉar tre facila por homoj nemulte instruitaj, ĝi estas komprenata sen peno de la personoj bone edukitaj.</p>	<p><i>Simples, flexível, sonora, verdadeiramente internacional em seus elementos, a língua Esperanto apresenta ao mundo civilizado a única verdadeira solução do problema de língua neutra, porque muito fácil para os homens não muito instruídos, ela é compreendida sem dificuldade pelas pessoas bem educadas.</i></p>
<p>02.03. Traduza para o português</p>	<p>Ĉu Esperanto estas facila? Jes, ĝi estas tre facila Kio estas Esperanto? Esperanto estas lingvo. La knabo skribas. Ĉu vi ne skribas? Kio estas tio? Tio estas tablo. Kiu estas vi? Mi estas Antono. Mi estas lernanto de Esperanto. Kaj vi? kiu vi estas? Mi estas Filipo. Mi estas instruisto.</p>	<p><i>O Esperanto é fácil? Sim, ele é muito fácil. O que é o Esperanto? Esperanto é uma língua. O menino escreve. Você não escreve? O que é isso? Isso é uma mesa. Quem é você? Sou o Antônio. Sou aluno de Esperanto. E você? Quem você é? Eu sou Felipe. Sou professor.</i></p>
<p>02.04. Primeiro Diálogo</p>	<p>Antono estas nova lernanto de Esperanto. Filipo estas instruisto de Esperanto. Ili parolas.</p> <p>Antono> Bonan Tagon! Kiel vi fartas? Filipo> Bone! Dankon! Kaj vi? Antono> Mi nomiĝas Antono. Kaj kiel vi nomiĝas? Filipo> Mi nomiĝas Filipo. Mi estas instruisto. Plezuron! Antono> Bone... Nun mi devas foriri...Ĝis revido!</p>	<p>Antônio é um novo aluno de Esperanto. Felipe é professor de Esperanto. Eles falam.</p> <p>Antônio> Bom dia! Como vai você? Felipe> Bem obrigado! e você? Antônio> Eu me chamo Antônio. E como você se chama? Felipe> Eu me chamo Felipe. Sou professor. Prazer! Antônio> Bem... Agora preciso ir embora... Até a vista!</p>

<p>02.05. Traduza para o português:</p>	<p>Mi legas; vi skribas. La patro volas skribi. La muroj estas altaj. Maria kantis bele. Marta, ne kuru! Esperanto estas lingvo tre facila kaj regula. Kie ni povus paroli? Estu ni bonaj amikoj. Ĉu ni iru? Mi vendis kaj vi aĉetis; nun vi pagu! Certe mi pagos.</p>	<p>Eu leio; você escreve. O pai quer escrever. Os muros são altos. Maria cantou belamente. Marta, não corra! Esperanto é uma língua muito fácil e regular. Onde poderíamos falar? Sejamos bons amigos. Vamos! Eu vendi e você comprou; agora pague! Com certeza, pagarei.</p>
<p>02.06. Traduza para o português:</p>	<p>La infano falis kaj ploris. Ĉu vi parolas en Esperanto? Ne, ankoraŭ mi lernas. Kiu vendis? Kiu aĉetis? Ĉu vi pagos? Kio brilas sur la ĉielo? La suno forte brilas. Varmaj tagoj estas agrablaj. Ĉu pluvos morgaŭ? Dio ne volu, ke morgaŭ pluvu. Kie ni estus feliĉaj? Ĉu vi bone dormis?</p>	<p>A criança caiu e chorou. Você fala em Esperanto? Não, ainda estou aprendendo. Quem vendeu? Quem comprou? Você vai pagar? O que brilha no céu? O sol brilha fortemente. Dias quentes são agradáveis. Choverá amanhã? Deus não queira que amanhã chova. Onde seríamos felizes? Dormiste bem?</p>
<p>02.07. Traduza para o Esperanto:</p>	<p>O Esperanto é fácil? Sim, ele é muito fácil. O que é o Esperanto? Esperanto é uma língua. O menino escreve. Você não escreve? O que é isso? Isso é uma mesa. Quem é você? Sou o Antônio. Sou aluno de Esperanto. E você? Quem você é? Eu sou Felipe. Sou professor.</p>	<p>Ĉu Esperanto estas facila? Jes, ĝi estas tre facila. Kio estas Esperanto? Esperanto estas lingvo. La knabo skribas. Ĉu vi ne skribas? Kio estas tio? Tio estas tablo. Kiu estas vi? Mi estas Antono. Mi estas lernanto de Esperanto. Kaj vi? kiu vi estas? Mi estas Filipo. Mi estas instruisto.</p>
<p>02.08. Traduza para o Esperanto:</p>	<p>Eu leio; você escreve. O pai quer escrever. Os muros são altos. Maria cantou belamente. Marta, não corra! Esperanto é uma língua muito fácil e regular. Onde poderíamos falar? Sejamos bons amigos. Vamos! Eu vendi e você comprou; agora pague! Com certeza, pagarei.</p>	<p>Mi legas; vi skribas. La patro volas skribi. La muroj estas altaj. Maria kantis bele. Marta, ne kuru! Esperanto estas lingvo tre facila kaj regula. Kie ni povus paroli? Estu ni bonaj amikoj. Ĉu ni iru? Mi vendis kaj vi aĉetis; nun vi pagu! Certe mi pagos.</p>

Capítulo 3	Exercícios	Respostas
<p>03.01. Dialogo 2 (Jair Salles)</p>	<p>En la Esperanto-Klubo. Tiu junulo estas Johano. Nun li estas en la Esperanto-Klubo. Karlo prezentis lin al Maria. Ŝi tre ŝatis lin. Johano> Io nova, Karlo? Karlo > Jes! Morgaŭ alvenos du junaj geesperantistoj el Eŭropo! Johano> Kiel ili nomiĝas? Karlo > Ili nomiĝas Marko kaj Klara. Maria > Mi tre dezirus koni ilin! Karlo > Do morgaŭ ni iros al la flughaveno...Ĉu bone? Maria > Ho! Bonege!</p>	<p>No clube de Esperanto. Aquele jovem é João. Agora ele está no Clube de Esperanto. Carlos o apresentou à Maria. Ela gosta muito dele.</p> <p>João > Algo de novo, Carlos? Carlos> Sim! Amanhã chegarão dois jovens esperantistas da Europa! João > Como eles se chamam? Carlos> Eles se chamam Marcos e Clara. Maria > Eu desejaria muito conhecê-los! Carlos> Então amanhã nós iremos ao aeroporto...Está bem? Maria> Oh! Excelente!</p>
<p>03.02. Traduza para o Esperanto utilizando os afixos "-in-", "mal-" e as terminações: "-o","-a","-e"</p>	<p>Lobo, filho, esposo, noivo, porco, boi, tio, pai, raposa, cavalo, loba, filha, esposa, noiva, porca, vaca, tia, mãe, raposa, égua, rico, jovem, bonito, alto, feliz, novo (p/objetos),nova, pobre, velho, feio, baixo, infeliz, velho (p/objetos), fechar, sucesso, muitos, na frente, abrir, insucesso, poucos, atrás, saúde, saudável, saudavelmente, doença, doente, doentamente.</p>	<p>Lupo, filo, edzo, fianĉo, porko, bovo, onklo, patro, vulpo, ĉevalo, lupino, filino, edzino, fianĉino, porkino, bovino, onklino, patrino, vulpino, ĉevalino, riĉa, juna, bela, alta, feliĉa, malriĉa, maljuna, malbela, malalta, malfeliĉa, malnova, fermi, sukceso, multaj, antaŭ, malfermi, malsukceso, malmultaj, malantaŭ, sano, sana, sane, malsano, malsana, malsane</p>
<p>03.03. Pronomes Possessivos</p>	<p>mia ... miaj, via ... viaj lia ... liaj ŝia ... ŝiaj ĝia ... ĝiaj nia ... niaj ilia...iliaj onia....oniaj sia ... siaj Mi estas via lernanto, mi ne estas ŝia lernanto. Miaj kraĵonoj estas sur nia lito, ne sur ilia seĝo. Marko ripozas sur sia lito, ne sur ŝia. La hundino kaj ĝiaj idoj estas en sia skatolo.</p>	<p>Meu... meus, Seu(de você)... seus (de você) Seu,sua,seus,suas (dele) Seu,sua,seus,suas (dela) Seu,sua,seus,suas (deles/delas) (neutro) Nosso(a)...nossos(as) Seus, suas (deles/delas) (oni = a gente)Seus, suas (da gente) Seu,sua... seus, suas (reflexivo da 3a.pessoa sing./plural)</p> <p>Eu sou seu (de você) aluno, eu não sou aluno dela. Meus lápis estão sobre nossa cama, não sobre a cadeira deles. Marcos repousa sobre a sua cama (dele mesmo), não sobre a dela. A cadela e seus filhotes estão na caixa deles (mesmos).</p>

<p>03.04. Leitura e tradução:</p>	<p>La Lingvo Internacia</p> <p>Lingvo helpa internacia estas absolute necesa. La tuta tero estas nun kiel granda turo Babela. La rilatoj inter la homoj de la diversaj nacioj ne estas facilaj. Rimedo por reciproka kompreno estas necesa. La lingvo Esperanto perfekte taŭgas por tiu celo; ĉar vi rimarkas, kiel simpla kaj facila estas ĉi tiu lingvo. Tamem multaj personoj ekzistas, kiuj kredas, ke tio ne estas vero. Neniu estas pli blinda, ol tiu, kiu ne volas vidi. Neniu estas pli surda, ol tiu, kiu ne volas aŭdi. Ili rigardu kaj atentu, ili aŭskultu kaj legu, kaj ili konstatos, ke ni estas pravaj, kiam ni pretendas ke nenia natura lingvo estas pli facila kaj regula ol Esperanto.</p>	<p>A Língua Internacional</p> <p>Uma língua auxiliar internacional é absolutamente necessária. A Terra toda é agora como uma grande torre de Babel. As relações entre os homens das diversas nações não são fáceis. Um meio para a compreensão recíproca é necessário. A língua Esperanto se adequa perfeitamente a este objetivo; porque você percebe quão simples e fácil é esta língua. Todavia existem muitas pessoas que acreditam que isso não é verdade. Ninguém é mais cego, do que aquele, que não quer ver. Ninguém é mais surdo do que aquele que não quer ouvir. Que eles vejam e prestem atenção, que eles ouçam e leiam, e eles constataram que nós temos razão, quando pretendemos que nenhuma língua natural é mais fácil e regular, do que o Esperanto.</p>
<p>03.05. Tradução:</p>	<p>Johano > Ĉu io nova, Karlo? Karlo > Jes! Morgaŭ alvenos du junaj geesperantistoj el Eŭropo! Johano > Kiel ili nomiĝas? João > Como eles se chamam? Karlo > Ili nomiĝas Marko kaj Klara. Maria > Mi tre dezirus koni ilin! Karlo > Do morgaŭ ni iros al la flughaveno. Ĉu bone? Maria > Ho! Bonege!</p>	<p>João > Algo de novo, Carlos? Carlos > Sim! Amanhã chegarão dois jovens esperantistas da Europa! Carlos > Eles se chamam Marcos e Clara. Maria > Eu desejaria muito conhecê-los! Carlos > Então amanhã nós iremos ao aeroporto. Está bem? Maria > Oh! Ótimo!</p>
<p>03.06. Texto:</p>	<p>Gerda Malaperis (Claude Piron)</p> <p>(En universitata restoracio)</p> <p>Tom > Saluton, Linda. Linda > Saluton, Tom. Tom > Diru al mi ku estas tiu? Linda > Kiu? Tom: Tiu alta, blonda, juna viro... Linda > Kiu? Tom: Tiu, kiu sidas en la angulo. Linda > Ho, tiu! Tom > Jes, tiu. Linda > Mi ne scias. Mi ne scias, kiu li estas. Nova studento, versâjne. Tom > Li estas tute sola.</p>	<p>Gerda Malaperis é um livro muito interessante feito por Claude Piron, com a finalidade de gradativamente ir introduzindo o vocabulário do Esperanto. Você deveria adquirir-lo para treinar e aperfeiçoar o seu Esperanto. Existe um vocabulário que o acompanha para os estudantes de língua portuguesa, peça-o também!</p> <p>Os textos, aqui não serão traduzidos, daremos apenas algumas dicas para facilitar a sua compreensão. É importante, no aprendizado de qualquer idioma, que não se aprenda traduzindo, mas compreendendo as situações no próprio idioma. Treinando bem o vocabulário, você terá plena condição de compreender os textos de Gerda Malaperis.</p> <p>No texto acima, vemos que Tom e Linda estão num restaurante universitário, cumprimentam-se e começam a conversar sobre um rapaz alto e louro que não conhecem e que julgam ser um novo estudante. Depois começam a falar de</p>

	<p>Linda> Ne. Rigardu: bela knabino iras al li. Tom> Ne bela. Juna, eble, sed ne bela. Nur vi estas bela, Linda. Linda> Tom, kara! Kio okazas al vi? Eble vi laboras multe, kaj... Tom> Neniu speciala okazas al mi. Kaj mi ne laboras tro multe. Fakte mi laboras malmulte nun. La vera demando estas: Kio okazas al vi, Linda? Nur vi estas vere bela. Linda> Nu, nu... Tom> Estas fakto. Nur vi estas bela, Linda. Mi estas sincera. Venu kun mi! Linda> Sed ... Tom: Venu. Al la granda spegulo. Rigardu. Jen estas Linda, la plej bela virino en la mondo, la plej bela virino en la tuta mondo. Linda> Kaj jen estas Tom, la plej malserioza knabo en la tuta universitato.</p>	<p>uma jovem que Linda julga bonita, mas Tom discorda dizendo ser Linda a pessoa mais bela. Ela acha que ele está trabalhando muito e por isso não está julgando bem as coisas. Tom argumenta mais um pouco. Ele a leva até o espelho, para mostrar que ela é a mulher mais bonita do mundo. Ela diz que ele é o menino mais brincalhão de toda universidade.</p>
<p>Capítulo 4</p>	<p>Exercícios</p>	<p>Respostas</p>
<p>04.01. Dialogo:</p>	<p>La Alveno (Jair Salles)</p> <p>Jen Marko kaj Klara! Ili ĵus alvenis el Eŭropo! Nun ili estas en la flughaveno. Per foto, Karlo kaj Maria tuj rekonis ilin. Karlo > Permesu!... Ĉu vi parolas Esperanton? Marko > Jes!... Maria > Ĉu vi estas Marko kaj Klara? Klara > Jes, ni estas! Kaj vi? Ĉu vi estas Karlo kaj Maria? Karlo > Jes, ni estas! Ĉiuj > Plezuron!... Plezuron!... Klara > Sed... kiel vi rekonis nin? Maria > Per via foto... Klara > Ho! Jes! Ni sendis la foton ĝuste por tio... Karlo > Bone. Nun mi dezirus prezenti vin al mia familio. Ĉu bone? Marko kaj Maria > Bonege!</p>	<p>A Chegada (Jair Salles)</p> <p>Eis Marcos e Clara! Eles acabaram de chegar da Europa. Agora eles estão no aeroporto. Por foto, Carlos e Maria logo os reconheceram.</p> <p>Carlos > Com licença!... Você fala Esperanto? Marcos > Sim!... Maria > Vocês são Marcos e Clara? Marcos > Sim, nós somos! E vocês? Vocês são Carlos e Maria? Carlos > Sim, nós somos! Todos > Prazer!... Prazer!... Clara > Mas...como vocês nos reconhecimento? Maria > Pela foto de vocês... Clara > Oh! Sim! Nós enviamos a foto justamente para isso... Carlos > Bem. Agora eu desejaria apresentá-los à minha família. Está bem? Marcos e Clara > Ótima!</p>

<p>04.02. Demandaro pri la dialogo:</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. Kiuj ĵus alvenis el Eŭropo? 2. Kie ili estas nun? 3. Ĉu ankaŭ Karlo kaj Maria estas nun en la flughaveno? 4. Kiel Karlo kaj Maria tuj rekonis ilin? 5. Kiuj sendis la foton? 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Marko kaj Klara ĵus alvenis el Eŭropo 2. Nun ili estas en la flughaveno. 3. Jes, ankaŭ ili estas nun tie. 4. Per foto, Karlo kaj Maria tuj rekonis ilin. 5. Marko kaj Klara sendis ĝin.
<p>04.03. Sufixos "-ET" e "-EG"</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. casa casinha casarão 2. porta portinha portão 3. quente morno muito quente 4. cidade cidadezinha metrópole 5. grande grandinho enorme 6. belo bonitinho maravilhoso 7. pequeno (adj.) grande (adj.) 	<ol style="list-style-type: none"> 1. domo dometo domego 2. pordo porteto pordego 3. varma varmeta varmega 4. urbo urbeto urbego 5. granda grandeta grandega 6. bela beleta belega 7. malgranda" ou "eta" "granda" ou "ega"
<p>04.04. Procure os erros nas frases.</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. La patro vokis la filo. 2. Mi amas vin kaj miaj fratojn. 3. Mia patro estas bona inĝeniero. 4. Ĉesis la bruon kaj la birdoj kantas. 5. La maro ŝajnas trankvilan lokon. 6. Kio ŝi faris? Ŝi faris kukon. 7. Kio vi estas? Mi estas instruiston. 8. Mi vojaĝis kun miajn amikojn. 	<ol style="list-style-type: none"> 1. filoN <- falta o acusativo. 2. miajN <- o adjetivo do objeto direto tem acusativo 3. (a frase está correta) 4. bruO <- "ĉesis" é intransitivo e "bruo" é sujeito. 5. lokO <- "ŝajnas" é verbo de ligação. 6. KioN <- pergunta por uma coisa que é objeto indireto. 7. instruiŝto <- predicativo não tem acusativo 8. miaj amikoj <-após preposição não se usa acusativo
<p>04.05. Coloque o interrogativo necessário.</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. ____ estas tablo? Tablo estas meblo. 2. ____ vi estas instruisto? 3. ____ librojn vi aĉetis? Teknikajn. 4. ____ vi vidis? Mi vidis lin. 5. ____ estas vi? Mi estas Antono kaj Maria. 6. Kun ____ li venis ? Kun sia filo Manuelo. 7. ____ vi faras ? grandajn tablojn. 8. ____ vi kantas bone? Ne. 9. Inter ____ vi vivas? Inter la membroj de mia familio. 10. ____ personojn vi konos? miajn kolegojn. 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Kio 2. Ĉu 3. Kiajn 4. KiuN 5. Kiuj 6. kiu 7. Kion 8. Ĉu 9. kiuj 10. Kiujn 11. Kio

	11. ____ estas sur la tablo? Fruktoj kaj legomoj.	
04.06. Diga os números em voz alta	<p>1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10 11, 12, 13, 14, 15, 16, 17, 18, 19 20, 21, 26, 28, 29, 30 40, 50, 60, 70, 80, 90, 100 101, 134, 199, 200 342, 787, 999 1000, 2623, 1992 353298</p>	<p>unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek dekunu, dekdu, dektri, dekkvar, dekkvin, dekseks, deksep, dekok, deknaŭ dudek, dudek unu, dudek ses, dudek ok, dudek naŭ, tridek kvardek, kvindek, sesdek, sepdek, okdek, naŭdek, cent cent unu, cent tridek kvar, cent naŭdek naŭ, ducent tricent kvardek du, sepcent okdek sep, naŭcent naŭdek naŭ mil, du mil sescent dudek tri, mil naŭcent naŭdek du tricent kvindek tri mil ducent naŭdek ok</p>
04.07. Texto	<p>Gerda Malaperis - Ĉapitro 2</p> <p>Linda: Tom! Tom: Kio okazas al vi? Vi estas pala! Bela, sed pala. Linda: Tom! Ne rigardu! Tom: Kio okazas? Linda: Strange! Okazas io stranga, io tre stranga. Tiu ulo, tiu nova studento... Ne, ne, mi petas vin, ne rigardu. Estu diskreta. Tom: Diable! Diru al mi. Kio estas tiu mistero? Linda: Lia mano agas strange. Rigardu, se vi volas, sed plej diskrete. Turnu vin iomete, eble, sed tute nature. Li ne vidu, ke vi rigardas al li. Tom: Vi pravas. Io stranga okazas. Dum ŝi ne rigardas al li - ŝi nun rigardas al la granda spegulo - lia mano iom post iom, tre tre malrapide, proksimiĝas al ŝia taso... Linda: Estas io en lia mano... Tom: Mi ne vidas. Li estas tro malproksima. Diable! Tiu alta forta knabo nun staras inter ili kaj mi. Mi ne plu vidas. Linda: Sed mi vidas. Mi vidas bone. Mi vidas tre bone. Mi vidas tute bone. Ej! Tom: Kio okazas? Linda: Ŝi rigardas al li nun, kaj lia mano haltas. Tom: Kaj kio plu?</p>	<p>Gerda Malaperis - Capítulo 2 - Explicações</p> <p>Linda e Tom ainda estão no restaurante. Linda, pálida, chama a atenção de Tom para algo estranho com o novo estudante, mas ela pediu que ele fosse discreto e natural ao olhar. Ela comenta que o rapaz estava agindo estranhamente com as mãos. Tom dá razão a ela. Enquanto a moça estava olhando para o espelho, o rapaz aproximou sua mão da xícara dela. Havia algo na mão dele. Mas, nesse momento, um outro rapaz forte ficou de pé na frente de Tom e ele não pode ver mais, mas Linda continuava a ver bem e ela descrevia para ele que a moça agora olhava para o rapaz e que a mão dele tinha parado. O rapaz, então, começou a falar com ela, possivelmente tentando desviar a sua atenção para a porta. E ela olhou para a porta. A mão do rapaz voltou a se aproximar da xícara da moça e quando a mão se afastou já não continha mais nada.</p>

	<p>Linda: Nun li parolas al ŝi. Li montras al la pordo. Tom: Eble li volas, ke ŝi rigardu al alia direkto, ke ŝi ne plu rigardu al li. Linda: Prave, tute prave. Jen ŝi rigardas al la pordo. Li plu parolas kaj parolas. Dum ŝi ne rigardas al lia direkto, lia mano plu proksimiĝas al la taso. Ej! Tom: Kio? Kio okazas? Linda: Lia mano revenas, tute diskrete, kvazaŭ tute nature. Tom: Ĉu estas io en lia mano? Linda: Nenio plu. Sed tute certe nun estas io en ŝia taso.</p>	
<p>Capítulo 5</p>	<p>Exercícios</p>	<p>Respostas</p>
<p>05.01. Leitura, interpretação e tradução</p>	<p>Hejme kaj Promenante - (Jair Salles)</p> <p>Marko kaj Klara estas nun en la hejmo de Karlo. Ankaŭ Maria estas tie. La gepatroj de Karlo nomiĝas S-ro Paŭlo kaj S-ino Marta. Karlos prezentis ilin al Marko kaj Klara.</p> <p>S-ro Paŭlo> Ni havas vere grandan plezuron koni vin!... S-ino Marta> Sentu vin hejme! Karlo> Fakte ni deziras, ke vi ne nur sentu vin hejme, sed ke vi restu hejme!... Maria> Jes! Ili volas, ke vi gastigu ĉe ili! Klara> Bone... Tio estas nerezistebla invito...Ĉu ne, Marko? Marko> Kompreneble!...</p> <p>En la sekvinta tago, Karlo, Maria kaj la alilandaj geamikoj promenis. Ili vidis plurajn lokojn de la urbo. Kiam ili estis en la urbocentro, Klara diris: Klara> Via lando estas tre bela, kaj ĉefe ĉi tiu urbo! Ĝi estas vere mirinda!</p>	<p>Em Casa e Passeando (Jair Salles)</p> <p>Marcos e Clara estão agora na casa de Carlos. Maria também está lá. Os pais de Carlos chamam Sr.Paulo e Sra.Marta. Carlos os apresentou a Marcos e Clara.</p> <p>Sr.Paulo > Nós temos realmente um grande prazer em conhecê-los! Sra.Marta > Sintam-se em casa! Carlos: De fato nós desejamos que vocês não só sintam-se em casa, mas que vocês fiquem em casa... Maria > Sim! Eles querem que vocês se hospedem com eles!... Clara > Bem...isto é um convite irresistível...Não é Marcos? > Marcos > Naturalmente! (compreensivelmente)</p> <p>No dia seguinte, Carlos, Maria e os amigos estrangeiros passearam. Eles viram muitos lugares da cidade. Quando eles chegaram ao centro da cidade, Clara disse:</p> <p>Clara > O país de vocês é muito bonito, e principalmente esta cidade! Ela é realmente maravilhosa! Maria > Obrigada! Vocês são muito gentis! Mas agora nós devemos voltar para casa porque é quase hora do almoço.</p>

	Maria> Dankon! Vi estas tre ĝentilaj! Sed nun ni devas reveni, ĉar estas preskaŭ en la horo de la tagmanĝo.	
05.02. Demandaro	<ol style="list-style-type: none"> 1. Kie Marko kaj Klara estas nun? 2. Ĉu ankaŭ Maria estas tie? 3. Kiel nomiĝas la gepatroj de Karlo? 4. Kiu prezentis ilin al Marko kaj Klara? 5. Kion volas Karlo kaj liaj gepatroj? 6. Kion faris Karlo, Maria kaj alilandaj geamikoj en la sekvinta tago? 7. Kion ili vidis? 8. Kial ili devis reveni hejmen? 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Marko kaj Klara estas nun en la hejmo de Karlo. 2. Jes, ankaŭ ŝi estas tie. 3. Ili nomiĝas S-ro Paŭlo kaj S-ino Maria. 4. Karlo prezentis ilin al Marko kaj Klara. 5. Ili volas, ke Marko kaj Klara gastigu ĉe ili. 6. Ili promenis. 7. Ili vidis plurajn lokojn de la urbo. 8. Ili devis reveni hejme, ĉar estas preskaŭ la tagmanĝa horo.
05.03. Treinamento com numerais	<p>(primeiro) (oitavo) (décimo quinto) (octuagésimo segundo) (primeiramente) (em segundo lugar) (em décimo lugar) (triplo) (metade) (um vinte avos) (um centésimo) (cêntuplo) (três dúzias) (quatro centos) (cinco milhares) (uma dupla) (um quinteto) (um grupo de 15 pessoas) Dei aos meus filhos quatro cadernos para cada um. $6+7=13$; $30-5=25$ $4 \times 5=20$; $14/7=2$</p>	<p>unua oka dek-kvina okdek-dua unue due deke trioblo duono unu dudekonoj unu centono centoblo tri dekduoj kvar centoj kvin miloj duopo kvinopo dek-kvinopo Mi donis al miaj filoj po kvar kajeroj. ses plus sep estas dek tri; tridek minus kvin estas dudek kvin kvaroble kvin estas dudek; dek kvar dividita de sep estas du</p>
05.04. Tradução	<p>primavera verão outono inverno janeiro fevereiro março abril maio junho julho agosto setembro outubro novembro dezembro segunda terça quarta quinta sexta sábado domingo Rio de Janeiro, 6 de Setembro de 1996 $10:00$ $2:10$ $5:15$ $7:30$ $8:35$ $9:45$ $0:00$ $12:00$ $09:07:05$</p>	<p>primtempo somero aŭtuno vintro januaro februaro marto aprilo majo junio julio aŭgusto septembro oktobro novembro decembro lundo mardo merkredo ĵaŭdo vendredo sabato dimanĉo Rio-de-Ĵanejro, la 6-an de Septembro, 1996 la deka akurate; la dua kaj dek; la kvina kaj kvarono La sepa kaj duono; la oka kaj tridek; kvin kvarono antaŭ la deka Noktomezo; Tagmezo; Estas la naŭa, sep minutoj kaj kvin sekundoj</p>
05.05. Complete	<ol style="list-style-type: none"> 1. ____ libroj vi aĉetis? dek. ____ ili kostis? po 3 dolaroj. 2. ____ okazos la kunveno? Je la deka vespere. ____ vi iros? Ne. 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Kiom da; Kiom 2. Kiam; Ĉu 3. Kioma 4. Kie; Kia 5. Kion; Ĉu

	<p>3. ____ horo estas? Estas la 3-a vespere. 4. ____ vi estas? En mia domo. ____ estas la vetero? Bona. 5. ____ vi havas en la manoj? Fruktojn. ____ vi volas? Jes. 6. __patrino(sogra) __sinjoroj (senhores e senhoras) __vidi(avistar) 7. __fali (ruir) __knaboj (meninos e meninas) __doni (distribuir) 8. __ami (enamorar-se) __aperi (reaparecer) __edzoj(marido e mulher)</p>	<p>6. Bo; ge; ek 7. Dis; ge;dis 8. Ek; re; ge</p>
<p>05.06. Texto: leitura, interpretação e tradução livre.</p>	<p>Gerda Malaperis n-ro 3 (Claude Piron)</p> <p>Bob: Diable! Kio okazas? Vi aspektas kiel spionoj. Ĉu mi povas sidi kun vi? Linda: Saluton, Bob. Tom: Bonan tagon, Bob. Bob: Bonan tagon, Linda. Bonan tagon, Tom. Pardonu, ke mi ne salutis vin tuj. Linda: Ne gravas. Nun vi salutis, kaj ni pardonas vin. Bob: Ĉu vi permesas, ke mi sidu ĉe via tablo? Linda: Kompreneble vi sidu kun ni. Bob: Mi tamen ne volas esti maldiskreta. Eble Tom parolas pri amo kaj preferas esti sola kun vi. Tom: Mi ne parolas pri amo. Linda: Li nur diris, ke mi ne estas la plej bela virino en la tuta mondo. Bob: Li pravas. Tio ne estas am-deklaro, tio estas simpla fakto. Tom: Prave. Simpla fakto. Bob: Nu certe, Linda estas tre bela, sed ne tio gravas nun. Linda: Ne gravas, ĉu? Ne gravas, ke mi estas bela, ĉu? Jen bela deklaro. Bob: Pardonu min. Mi volas diri, ke io estas pli grava. Tom: Kio? Pri kio vi parolas? Kio estas pli grava? Bob: Vi ne vidis min, dum mi proksimiĝis al vi, sed mi vin rigardis. Linda: Mi ne komprenis, pri kio vi parolas.</p>	<p>Gerda Malaperis 3 - Comentários</p> <p>Bob um novo colega, chega perto de Linda e Tom e comenta que eles parecem espiões. Ele se convida para se assentar junto a eles. Todo o texto está cheio de comentários em relação a beleza de Linda. Parece haver uma disputa entre Tom e Bob em relação a Linda. Bob faz elogios, mas chama atenção que na face dela havia uma expressão de misterio, algo de estranho.</p> <p>O importante deste texto é que há muitas orações subordinadas substantivas "..., ke ...". O "ke" é somente uma conjunção integrante e nunca poderá ser usado como um pronome relativo. Os pronomes relativos se traduzem por "kiu, kia" ligando orações subordinadas adjetivas aos termos qualificados: La knabo, kiun vi vokis, estas mia amiko. (O menino que você chamou é meu amigo). Note que o "KE" é uma palavra invariável e os pronomes relativos recebem o acusativo quando for o caso.</p>

	<p>Bob: Mi parolas pri via vizaĝo. Linda: Kio pri mia vizaĝo? Ĉu ĝi ne estas bela? Bob: Ho jes, ĝi estas bela. Ĝi estas la plej bela en la mondo. Sed ĝi estis mistera! Linda: Mistera? Ĉu mia vizaĝo estis mistera? Bob: Jes. Via vizaĝo estis mistera. Fakte, viaj vizaĝoj estis misteraj. Mistera vizaĝo de spionino ĉe mistera vizaĝo de spiono. Vi aspektis strange. Vi aspektis mistere. Mi bone rigardis vin, dum mi proksimiĝis al vi.</p>	
<p>05.07. Respondu la demandojn pri la Gerda Malaperis 3</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. Kiu alvenas al Tom kaj Linda? 2. Kiel aspektas Tom kaj Linda? 3. Ĉu li salutis ilin? 4. Kion li diris al ili? 5. Kie li sidis? 6. Kiu diris, ke Linda estas la plej bela virino de la mondo? 7. Kiaj estis la vizaĝoj de Tom kaj Linda? 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Bob alvenas al Tom kaj Linda. 2. Linda kaj Tom aspektas kiel spionoj. 3. Jes, li salutis ilin. 4. Bob diris al ili Bonan Tagon. 5. Li sidis ĉe ilia tablo. 6. Tom diris tion. 7. Iliaj vizaĝoj estis misteraj kaj strangaj.
<p>Capítulo 6</p>	<p>Exercícios</p>	<p>Respostas</p>
<p>06.01. Dialogo: Leia alto e traduza</p>	<p>Studo kaj Laboro - (Sylla Chaves)</p> <p>Petro kaj Filipo daŭrigas sian longan marŝadon al la klubo de Esperanto. Survoje ili parolas pri studo kaj laboro.</p> <p>Filipo > Petro, ĉu vi vere havas tempon por studi kaj labori? Petro > Jes, kaj mi ankaŭ havas kroman tempon por Esperanto. Filipo > Kiun laboron vi havas? Kaj kion vi faras tie? Petro > Mi estas oficisto en malgranda banko. Mi maŝinskribas, faras kalkulojn kaj, de tempo al tempo, respondas al demandoj per telefono. Filipo > Ĉu vi intencas longe resti en tiu banko?</p>	<p>Estudo e Trabalho - (Sylla Chaves)</p> <p>Pedro e Filipe continuam sua longa caminhada ao clube de Esperanto. A caminho eles conversam sobre trabalho e estudo.</p> <p>Felipe > Pedro, você tem tempo de verdade para estudar e trabalhar? Pedro > Sim, e ainda tenho um tempo de sobra para o Esperanto. Felipe > Que trabalho você tem? E o que você faz lá? Pedro > Eu sou funcionário de um banco pequeno. Eu bato à máquina, faço contas e, de tempo em tempo, atendo perguntas ao telefone. Felipe > Você pretende ficar muito tempo nesse banco? Pedro > Não eu sou estudante, e pretendo me tornar médico. Felipe > E como você consegue achar tempo para estudar Esperanto?</p>

	<p>Petro > Ne. Mi estas studento, kaj intencas fariĝi kuracisto. Filipo > Kaj kiel vi sukcesas trovi tempon por studi Esperanton? Petro > Mi faras tion sabate, kiel hodiaŭ. Sed ni devas rapidi, ĉar mia leciono baldaŭ komenciĝos. Filipo > Do ni rapidu. Ĉu la klubo ankoraŭ estas malproksima? Petro > Ne. Ni jam alvenis, jen ĝia pordo. Ni alvenis en la ĝusta tempo.</p>	<p>Pedro > Faço isso aos sábados, como hoje. Mas precisamos nos apressar, porque minha lição começará em breve. Felipe > Vamos correr. O clube ainda está longe? Pedro > Não. Nós já chegamos. Eis a sua porta. Chegamos na hora.</p>
<p>06.02. Respondu la demandaron</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. Kie Petro laboras? 2. Kion li faras en sia laborejo? 3. Kiun profesion li volas havi? 4. Kiel li kaj Filipo marŝis? 5. Kia estis la marŝado al la klubo? 6. El kie ili venis? 7. Kies leciono okazas sabate? 8. Kiam ili alvenis al la klubo? Ĉu frue aŭ malfrue? 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Li laboras en malgranda banko. 2. Li maŝinskribas, faras kalkulojn kaj respondas demandojn telefone. 3. Li volas esti kuracisto. 4. Rapide. Ili devis atingi la klubon en ĝusta horo. 5. Longa, sed agrabla, ĉar ili parolis survoje. 6. Eble, el la domo de Petro, mi ne scias certe. 7. La leciono de Petro. Li studas Esperanton sabate ĉe la klubo. 8. Ili alvenis en la ĝusta tempo. Nek frue, nek malfrue.
<p>06.03. Correlativos.</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. O que? Qual? Quem? De Quem? Quando? Onde? Por que? Como? 2. de algum tipo aquilo desse tipo ninguém por todos motivos 3. de alguém quanto? dessa pessoa de ninguém algo tudo 4. desta maneira em algum lugar lá em todos os lugares 5. por algum motivo em alguma quantidade por todas as razões 6. em nenhuma quantidade naquele tempo de todas as maneiras 7. assim por esse motivo de alguma forma em toda quantidade 8. nunca aquele de nenhum tipo por nenhuma razão sempre 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Kio.. Kia.. Kiu. Kies.. Kiam. Kie. Kial.. Kiel 2. ia.. tio.. tia. neni.. ĉial 3. ies.. Kiom. ties. nenies. io.. ĉio 4. tiel.. ie. tie. ĉies 5. ial.. iom.. ĉial 6. neniom. tiam. ĉiel 7. tiel.. tial.. iel. ĉiom 8. neniam. tiu.. nenia. nenial.. ĉiam
<p>06.04. Kompletigu la frazojn</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. ___ estas mia libro? __, eble ___ sur la tablo. 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Kie. Ie. tie 2. Ĉu.. iam (uma hora qualquer)

	<p>2. ___ vi venis hodiaŭ? Ne, mi venis hieraŭ ___ ajn. 3. ___ libroj estas ___? de Karlo aŭ eble ___ (de alĝuém) 4. ___ filmo vi vidis hieraŭ? ___ ajn (Uma coisa qualquer). 5. ___ vi venis ___ (dessa forma)? Ĉar vi vokis min. 6. La viro, ___ ni devas helpi, estas tre malforta. 7. La vestoj, ___ vi volis, mi ne sukcesis trovi. 8. Esperanto estas lingvo, ___ estas internacia. 9.</p>	<p>3. Kies.. tiuj. ies 4. Kiun. iun 5. Kial .tiel 6. kiun 7. kiajn 8. kiu</p>
<p>06.05. Gerda Malaperis 4 (Claude Piron) Dialogo kaj interpretado</p>	<p>Bob : Diru al mi sincere: pri kio vi parolis? Tom : Ni parolis pri tiu ulo? Bob : Kiu ulo? Tom : Tiu ulo ĉe la angulo. Tiu juna viro. Bob : Pri kiu vi parolas? Ĉu pri tiu blondulo, kiu sidas kun Gerda? Linda:Gerda! Vi do scias, ke ŝia nomo estas Gerda!Vi do konas ŝin. Bob: Nu, mi ne vere konas ŝin. Mi scias kiu ŝi estas. Tio estas alia afero. Linda: Kiu do ŝi estas? Bob: Sed vi ne respondis al mi. Vi ne respondis al mia demando. Ĉu vere pri tiu blonda junulo vi parolis? Tom: Jes. Pri li. Bob: Mi ne konas lin. Mi neniam vidis lin antaŭe. Linda: Sed, diru al mi kiu estas tiu Gerda? Bob: Ŝi venis por instrui. Temas pri io mistera fakte. Kriptajŝo-scienco. Linda: Kio? Kiel vi diris? Krip-ta-ŝo-sci-en-co, ĉu? Kio estas tio? Bob: Ĉu vere vi ne scias, kio estas kriptajŝoscienco? Oni diras ankaŭ "kriptografio". Linda: Ne. Mi ne scias. Mi tute ne scias. Ĉu vi scias, Tom? Tom: Ĉu tio ne estas la arto kompreni, pri kio temas sekreta mesaĝo? Bob: Prave. Jen ŝia fako. Fakte, ŝia fako estas la malnovaj sekretaj lingvoj. Tom: Mi ne komprenas. Kiu, en universitato, volas lerni pri malnovaj sekretaj lingvoj?</p>	<p>Bob, Linda e Tom ainda estão no restaurante discutindo sobre Gerda. Agora eles discutem um pouco mais sobre ela. Bob sabe que ela é uma professora de criptografia. Linda não sabe o que é isso e eles esclarecem. Dizem ainda que Gerda foi convidada pelo professor de Linguística para ensinar essa matéria. Linda diz que ele possivel- mente a contratou, pois ela é muito bonita. Tom diz que Linda é que bonita. No final Bob conclui que Tom possivelmente ama Linda. Preste bastante atenção na formação das frases, o uso dos correlativos " kiam, kiel, kiu, kio." , e da conjunção " ke " ligando as orações.</p>

	<p>Bob: Ankaŭ mi ne tute komprenas. Estis ideo de Ronga, la profesoro pri lingvistiko. Li konsideras, ke sekretaj lingvoj estas aspekto de la arto komuniki, kaj ke ili do rilatas al lingvistiko.</p> <p>Linda: Eble jes. Eble li pravas. Kaj tamen tiu ideo estas iom stranga, ĉu vi ne konsentas?</p> <p>Bob: Jes. Ĝi aspektis strange ankaŭ al mi, kiam oni parolis pri ĝi.</p> <p>Linda: Eble Ronga, la lingvistika profesoro, nur deziris, ke bela virino kunlaboru kun li. Ĉu ne estas bona ideo kunlabori kun bela knabino, kiam tio estas ebla?</p> <p>Tom: Mi jam diris al vi, ke ŝi ne estas bela. Nur vi estas bela.</p> <p>Bob: Mi ne konsentas. Estas fakto, ke Linda estas tre bela, ke ŝi estas la plej bela knabino de la mondo. Sed ankaŭ Gerda estas bela. Iom malpli bela, sed tamen bela. Ĉu vi ne konsentas?</p> <p>Tom: Tute ne. Por vi, eble. Sed por mi ne. Por mi, nur Linda ekzistas kiel bela virino.</p> <p>Bob: Ĉu vi volas diri, ke por vi Linda estas la sola bela virino en la tuta mondo?</p> <p>Tom: Jes. Por mi, Linda estas la sola bela virino en la tuta mondo.</p> <p>Bob: Diable! Vi verŝajne amas ŝin.</p>	
<p>06.06. Demandaro</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. Ĉu Bob sciis, kiu estas la blondulino? 2. Kial Gerda venis al la Universitato? 3. Kio estas kriptografio? 4. Kies ideo estas, ke sekretaj lingvoj estas aspekto de komunikado? 5. Kiu verŝajne amas Linda, laŭ Bob? 6. Kiu ne konsentas ke nur Linda estas bela? 7. Kies fako estas la malnovaj sekretaj lingvoj? 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Jes, li sciis, kiu ŝi estas, kaj ankaŭ ke ŝi nomiĝas Gerda. 2. Ŝi venis por instrui kriptografio. 3. Ĝi estas la arto kompreni, pri kio temas sekreta mesaĝo. 4. De la profesoro de lingvistiko Ronga. 5. Tom verŝajne amas ŝin, ĉar li multe diras pri ŝia beleco. 6. Bob ne konsentas kun tio, nek Linda. Nur Tom tion diras. 7. Tiu fako estas de Gerda.

Capítulo 7	Exercícios	Respostas
07.01. Dialogo, tradução e interpretação	<p>La Esperanto-Klubo (Sylla Chaves – adaptiĝo)</p> <p>Petro kaj Filipo eniras. En la klubo jam estas pluraj personoj. Petro prezentas Filipon al ili.</p> <p>Petro: Bonan tagon al vi ĉiuj. Mi havas grandan plezuron prezenti al vi mian amikon kaj samideanon Filipo, kiun mi ĵus ekkonis. Li estas greka turisto, kiu vizitas nian landon. Li parolas nur greke, turke kaj Esperante.</p> <p>Karlo: Bonan tagon, Petro. S-ro Filipo, via vizito tre ĝojigas nin.</p> <p>Maria: Pardonu min, s-ro Filipo. Vi ĵus alvenis, kaj mi bezonas tuj foriri. Mia patrino atendas min frue, ĉar hodiaŭ estas ŝia datreveno.</p> <p>Filipo: Mi havas grandan plezuron koni vin, fraŭlino.</p> <p>Maria: Mi dankas, s-ro Filipo. Kaj ĝis revido. Ĝis alia fojo.</p> <p>Petro: Gratulu vian karan patrinon ankaŭ en mia nomo, Maria.</p> <p>Maria: Dankon, Petro. Ĝis.</p>	<p>O Clube de Esperanto (Sylla Chaves – adaptação)</p> <p>Pedro e Felipe entram. No clube já tem muitas pessoas. Pedro apresenta Felipe a eles.</p> <p>Pedro: Bom dia a vocês todos. Eu tenho um grande prazer de apresentar a vocês meu amigo e coidealista Felipe, a quem acabei de conhecer. Ele é um turista grego que está visitando o nosso país. Ele fala somente grego, turco e Esperanto.</p> <p>Carlos: Bom dia, Pedro. Sr.Felipe, sua visita nos alegra muito.</p> <p>Maria: Perdoe-me, Sr.Felipe. Você acabou de chegar, e eu preciso sair imediatamente. Minha mãe me espera cedo, porque hoje é o aniversário dela.</p> <p>Felipe: Tenho imenso prazer em conhecê-la, senhorita.</p> <p>Maria: Agradeço, sr.Felipe. E até a vista. Até a próxima vez.</p> <p>Pedro: Dê um abraço em sua querida mãe também em meu nome, Maria.</p> <p>Maria: Obrigado, Pedro. Até (Tchau).</p>
07.02. Demandaro.	<ol style="list-style-type: none"> 1. Al kiu Petro prezentis Filipon? 2. Kiom da personoj estis en la klubo? 3. Kiel li prezentis lin? 4. Kial Maria bezonis foriri? 5. Kion diris Maria pri sia patrino? 6. Kiel salutis Maria kiam ŝi foriris? 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Li prezentis lin al la personoj de la klubo. 2. Mi ne scias certe, sed en ĝi estis pluraj personoj. 3. Li prezentis lin per la frazo:"Mi havas grandan plezuron." 4. Ŝi bezonis foriri, ĉar ŝia patrino atendis ŝin frue. 5. Ŝi diris, ke hodiaŭ estas la datreveno de ŝia patrino. 6. Ŝi simple diris "ĝis revido. ĝis alia fojo".
07.03. Kompletigu la frazojn.	<ol style="list-style-type: none"> 1. Li estas ___ riĉa. Dio estas _____ (infinitamente) bona. 2. Esperanto estas ___ bela, ___ utila. (comparativo de egualdade) 3. Tiu vojaĝo estas ___ enuiga, ___ instrua. (comparativo de superioridade) 	<ol style="list-style-type: none"> 1. tre. senfine (superlativo absoluto) 2. tiel. kiel 3. pli. ol 4. malpli. ol 5. El. la plej 6. La malplej. el 7. tiel. kiel 8. pli. ol

	<ol style="list-style-type: none"> 4. Li estas _____ inteligenta, __ ruza. (comparativo de inferior.) 5. __ ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas __ _____ juna.(superlativo relativo de superioridade) 6. _____ riĉa __ miaj amikoj loĝas en Eŭropo.(superlativo relativo de inferioridade) 7. Neniam pluvis _____ forte, _____ hodiaŭ.(comparativo de igualdade) 8. Mi __ bone parolas la anglan, __ la francan (sup.rel.superior.) 	
<p>07.04. Verbaj afiksoj.</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. Ficar dando marteladas> martel__i. Fazer discurso> parol__i. 2. Embelezar> bel__i. Embelezar-se> bel__i. Esclarecer> klar__i. 3. Cruxificar> kruc__i. Juntar> kun__i. Avermelhar-se> ruĝ__i. 4. Obrigar> dev__i. Exagerar> tro__i. Nascer> nask__i. 5. Ficar batendo> bat__i. Fazer conhecido> kon__i. Escapar> el__i. 6. Alegrar> ĝoj__i. Ficar dançando> danc__i. Ficar de pé> star__i. 7. Casar-se (homens)> edz__i. Casar-se (mulheres)> edzin__i. 8. Tornar> far__i ou __i. Tornar-se> far__i ou __i. 	<ol style="list-style-type: none"> 1. ad ... ad 2. ig ... iĝ ... ig 3. ig ... ig ... iĝ 4. ig ... ig ... iĝ 5. ad ... ig ... iĝ 6. ig ... ad ... iĝ 7. iĝ ... iĝ 8. ig ... ig ... iĝ ... iĝ
<p>07.05. Nevariaj vortoj. Kompletigu kun la jenaj vortoj. APUD, DE, EKSTER, EN, SUB, SUPER, SUR, SEN.</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. Resti _____ (junto ao) sia patro. Libro __ Petro. 2. _____ (fora) la domo. ____ (sem) mono. (No) __ la poŝo. 3. Flugo _____ (sobre) la nuboj. (Exceto) _____ tiaj okazoj. 4. ____ (Sob)la piedoj. _____ (acima de)kapitano. ____(sobre)la tablo 5. Domo luita __ Marko. __ la mateno. Ĉapelo ____ la kapo. 6. Lago _____ (próximo de) Parizo. ____ stelplena ĉielo. 7. __ (em) libereco. Mi venas __ (proveniente de) Londono. 	<ol style="list-style-type: none"> 1. apud de 2. Ekster Sen En 3. super Ekster 4. Sub Super Sur 5. de En sur 6. apud Sub 7. En de 8. super sur ekster

	<p>8. Nuboj ____ la maro. Haroj ____ la kapo. Domo ____ (fora de) la urbo</p>	
<p>07.06. Afiksoj. Kompletigu kun la sufiksoj: -NJ-, -ĈJ-, -ID-, -ER-, -UL-, -AN-, -ESTR-, -IST-</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. Mariazinha> Mari__o. Bezerro> bov__o. Mamãe> pa__o. Papai> pa__o. 2. Prefeito> urb__o. Dentista> dent__o. Chefe escoteiro> Skolt__o. 3. Brasileiro> brazil__o. muda de planta> plant__o. Fagulha> fajr__o. 4. O Santo> Sankt__o. Marquinho> Mar__o. Elo de corrente>Ĉen__o. 5. O Jovem> jun__o. Corcunda> ĝib__o. A bonitinha> bel__ino. 6. Berlinense> berlin__o. Maetro> orkestr__o. O Rico> riĉ__o. 7. filhote de gato> kat__o. Capitão do Navio> ŝip__o. 8. Cantor> kant__o. Clarinha(Klara)>Klar__o. Zé(Josefo)>Joze__o. 	<ol style="list-style-type: none"> 1. nj. id. nj. ĉj 2. estr. ist. estr 3. an. id. er 4. ul. ĉj. er 5. ul. ul. ul 6. an. estr. ul 7. id. estr 8. ist. nj. ĉj
<p>07.07 Gerda Malaperis - 5 (Claude Piron) Legado kaj interpretado</p>	<p>Bob: Nu, vi ankoraŭ ne diris al mi, kio okazis dum vi spione rigardis tiun paron. Linda: Okazis io vere stranga. Tom: Vere stranga, fakte. En la mano de tiu junulo estis io. Bob: Kio? Linda: Ni ne povis vidi. Io tre eta. Malgranda afero. Afereto. Tom: Kaj dum ŝi ne rigardis, lia mano alproksimiĝis al ŝia taso. Linda: Kaj kiam ŝi rigardis lin, lia mano ekhaltis. Tom: Tiam li montris ion al ŝi. Evidente, li deziris forturni ŝian atenton. Linda: Kaj li sukcesis. Li plene sukcesis. Ŝi rigardis al la pordo. Kaj dum ŝi rigardis for, lia mano subite estis super ŝia taso, dum unu sekundo, ne pli, kaj tute nature revenis. Malplena. Bob: Ĉu ĝi estis plena antaŭe? Tom: Ne plena. Komprenoble, ĝi ne estis plena. Sed estis io en ĝi, kaj</p>	<p>7-Comentários sobre o texto</p> <p>Agora Linda e Tom contam a Bob sobre os acontecimentos estranhos que eles viram acontecer. Disseram que o rapaz jogou algo dentro da xícara de Gerda de uma forma dissimulada. Bob disse que possivelmente fosse uma pedra de açúcar. Gerda se levanta e sai.</p>

	<p>post kiam ĝi estis dum sekundo super la taso de Gerda, estis plu nenio en ĝi.</p> <p>Linda: Certe estas iu mistera substanco.</p> <p>Tom: Iu drogo.</p> <p>Bob: Kiel vi povas scii, ke ne estis tute simple peco da sukero?</p> <p>Linda: Li ne agus tiel kaŝe, se estus nur sukero.</p> <p>Tom: Cetere, ĉi tie ne estas peca sukero. Estas nur pulvora sukero, en sulkerujoj.</p> <p>Bob: Eble li havis sukerpecon en la poŝo kaj.</p> <p>Tom: Ĉu vi ofte promenas kun sukerpecoj en via poŝo?</p> <p>Bob: Vi pravas. Tiu ideo estas absurda. Tamen.</p> <p>Linda: Rigardu! Jen ŝi ekstaras, kaj ekiras for.</p> <p>Bob: Ŝi ŝajnas tute normala. Verŝajne vi imagis ion draman, dum temas pri tute simpla, tute natura okazaĵo.</p>	
<p>07.08. Demandaro pri "Gerda Malaperis"</p>	<ol style="list-style-type: none"> 1. Kion rakontis Linda kaj Tom al Bob? 2. Ĉu Tom kaj Linda pensas, ke tiu aĵo estas drogo? 3. Kial simple tia aĵo ne estu sukerpeco? 4. Ĉu ankaŭ sur la tabloj estas sukerujoj kun sukerpecoj? 5. Kiu ankoraŭ pensas, ke tia mistera situacio estas tre drama? 6. Kion do li pensas? 7. Kaj kion vi pensas? 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Ili diris, ke la junulo apud Gerda metis ion en la tason de Gerda. 2. Jes, ili certe pensas tion. 3. Ĉar la junulo metis ĝin en la taso de Gerda kaŝe. 4. Ne, nur sukerujoj kun pulvora sukero. 5. Bob ankoraŭ pensas tiel. 6. Li simple sentas, ke ĝi temas pri natura kaj simpla okazintaĵo.
<p>Capítulo 8</p>	<p>Exercícios</p>	<p>Respostas</p>
<p>08.01. Dialogo kaj interpretado</p>	<p>La Esperanto-Movado (Sylla Chaves)</p> <p>Karlo: S-ro Filipino, parolu nun pri la Esperanto-Movado en via lando</p> <p>Filipo: Mi havas malmulton por diri. Mia lando estas malgranda, kaj nia movado estas malforta. Same kiel en la tuta mondo, nia boro estas konstanta kaj malfacila: Per siaj privataj rimedoj</p>	

	<p>nia grupeto klopodas diskonigi la internacian lingvon kaj instrui ĝin je malalta kosto. Niaj instruistoj laboras tute senpage.</p> <p>Karlo: Ĉi tie okazas la samon. Esperanto estas por ni idealo. Kaj ŝajnas, ke ĝi ankoraŭ estas tre malproksima.</p> <p>Petro: Se ni estus pli multaj aŭ pli riĉaj, nia afero estus pli facila.</p> <p>Filipo: Tamen ni povas esti certaj, ke Esperanto pli taŭgas por internaciaj rilatoj ol iu ajn alia lingvo.</p> <p>Karlo: Vi pravas. Ĝi estas la plej simpla ĉiutage parolata lingvo. Kaj, krome, ĝi estas neŭtrala.</p> <p>Filipo: Ĉiuj parolantoj de Esperanto povas nomi ĝin sia lingvo. Ĝi apartenas same al ĉiuj popoloj.</p> <p>Karlo: Eĉ Zamenhof mem, la kreinto de Esperanto, diris, ke la lingvo ne apartenas al li, kaj ke ĝia estonta evoluo dependos de ĝiaj uzantoj.</p> <p>Filipo: Esperanto estis majstre kreita. Estas preskaŭ nekredebla la fakto, ke Zamenhof estis tre juna, kiam li kreis tiun majstroverkon. Karlo: Tio estas genio. Ĝi ne havas aĝon.</p> <p>Filipo: Kaj nia tasko estas labori, por ke nia revo fariĝu realo en la baldaŭa estonteco.</p>	
